**JULIA SIGMOND** (1929-2020)

Hungardevena rumana civitanino, emerita pupaktorino, konata Esperanto-verkistino mortis la 23-an de marto en Piacenza, Italio. Ŝia forpaso estas granda perso por la originala Esperanto-literaturo.

La 27-an de marto en la sama hospitalo forpasis ŝia edzo Filippo Francesĉi, **Sen Rodin**. Li junaĝe lernis Esperanton en sia naskiĝurbo Padova. Post emeritiĝo li translokiĝis al eta vilaĝo en la Apeninoj apud Piacenza kaj tie translokiĝis Julia post ilia geedziĝo.

Unu el la lastaj libroj eldonitaj de Julia estis aro da tradukoj de ŝia poemo "***Dialogo***", en 52 lingvoj.

**DIALOGO**

Kaj se jam ĉion ni rakontis, pri kio ni parolos ?
- Ĉiam ekzistos io pri kio paroli
Kaj se ne plu estos ?
- tiam ni silentos
Kaj tiam ni ne plu amos unu la alian ?
- tiam ni eĉ pli amos unu la alian
Kaj tiam ne doloros la silento ?
- la silento ne doloras, se ni amas
Kaj se la silento doloros ?
- Tiam ni denove ekparolos
Kaj pri kio ni parolos ?
- Pri tio kial doloras la silento
Kaj tiam ni amos nin unu la alian ?
- ĉiam ni amos unu la alian
Kaj se ni ne scios, kial doloras la silento ?
- Tiam ni kantos.
Kaj se ni ne konas la kanton de la alia ?
- Tiam ni instruos unu la alian
Kaj se ni ne povos lerni ilin ?
- Tiam ni aŭskultos la kantojn de la alia
Kaj se ni jam ne aŭdos ?
- tiam silente ni rigardos unu la alian
Kaj se ni ne plu vidos ?
- Tiam ni prenos la manon de la alia
Kaj tiam ankoraŭ ni estos feliĉaj ?
- Dum ni vivos ni estos felicaj, ĉar ni amos unu la alian